Unua Informilo

Neforgesebla Seminario atendas vin en Kubo

Amerika Komisiono kunlabore kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj TEJO

ofertas

Seminarion por (estontaj) Esperanto-instruistoj kaj Esperanto-aktivuloj en Canimao, Matanzas, 11-17 julio 2010



Loko:

La seminario okazos en la hotelo Canimao samtempe kun la ILEI-konferenco. La kostoj por la seminario jam inkluzivas la loĝigon (dulita ĉambro) kaj du manĝojn (matenmanĝo kaj vespermanĝo).
La hotelo estas ideala por ĝui kompletan feriadon meze de trankvila kaj natura medio. Ĝi situas proksime al la bela urbo Matanzas. Aliaj turisme interesaj lokoj estas tre

proksime. La hotelo Canimao havas 158 komfortajn ĉambrojn klimatizitajn, ĉiuj kun privata necesejo duŝo, radio kaj satelita TV, restoracio, kafejo, trinkejo, nokta klubo, naĝejo, ludejo, masaĝ-ĉambro, reta servo, vendejo, monŝanĝejo kaj aliaj luksaĵoj.

La naĝejo de Canimao

Rigardo al hotelo Canimao

La ĉambroj

Rigardo de ekstere al Canimao

Celgrupo:

La seminario estas por personoj kiuj jam relative altnivele*(1) scipovas Esperanton kaj kiuj interesiĝas pri Esperanto-instruado, pri interkultura edukado kaj lernado per Esperanto, pri interkultura aliro al lingvo-instruado kaj lernadoj kaj ĝenerale pri aktiva kunlaboro en la Esperanto-movado.
*(1) = la kandidato komprenas senprobleme prezentadojn kaj legomaterialojn pri pedagogiaj kaj kulturaj tempoj, komprenigas sin parole kaj skribe kun evidenta scio de la gramatikaj reguloj kaj vortostoko adekvata por normala konversacio; = niveloj : B1/B2/C1 laŭ la Eŭropa Referenckadro pri lingvoj (KER); se estas duboj la aliĝantoj bv. peti pliajn informojn.

Celoj:

La celo de la seminario estas formi kursgvidantojn kaj gvidantojn de la Esperanto-movado.

Programo / Temoj:

La seminario inkluzivos ĉirkaŭ 30 ĝis 34 lernohorojn (po 45 min.) dum la tuta semajno, kelkajn retajn kurshorojn (preparo antaŭ la seminario kaj post reveno al la hejmlandoj) kaj eventuale laŭokaze iun kunvenon dum UK aŭ TEJO-Kongreso.
Ni okupiĝos pri jenaj temoj:

Lingvo: Elektitaj gramatikaĵoj kaj lingvaj tiklaĵoj laŭ ĝisnunaj spertoj kaj laŭ proponoj / demandoj de la seminarianoj

Metodiko:
- Celoj de lingvo-instruado kaj lernado. Lingvaj konoj kaj komunikkapabloj. Bazaj konceptoj de la Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KER);
- Lingvoinstruaj metodoj, laŭeble kun filmitaj ekzemploj de edukado.net;
- Interkultura aliro;
- Lecionplano;
- Ekzercoj kaj lingvaj ludoj.

Interkultura Metodiko
- Bazaj konceptoj kaj celoj de la interkultura edukado kaj lernado;
- Kunlabora esplorado pri interkultura temoj;
- Interkulturaj ludoj;
- Kiel utiligi la komunikreton, faciligojn kaj metodojn de la projekto Interkulturo.

Esperanto-Kulturo
- Historio;
- Literaturo;
- Movado.

Aktivula Trejnado
- Kontakto kun ĵurnalistoj, intervjuo, celoj de informa laboro;
- Organizado de Esperanto-kursoj, kion kaj kiel fari, kiel allogi partoprenantojn;
- Esperanto kaj Interreto, agadeblecoj;
- ĝeneralaj punktoj, memorganizado, organizado de grupoj, tempoplanado.

Grava: Ĉiuj seminarianoj senkoste povas partopreni la vesperan programon de la ILEI-konferenco.

Prezoj:

La seminario estas eksterordinare favorpreza, ĉar ni volas ebligi al plejeble multaj homoj ĝui tiun interesan seminarion. La kotizoj inkluzivas ses tranoktojn kun du manĝoj tage en tiu, komence kun vespermanĝo je la alventago kaj fine kun matenmanĝon je la forirtago. Ĝi ne inkluzivas la ekskurson, kiun ofertas ILEI dum la ILEI-konferenco por tiuj kiuj pagas la plenan konferencan kotizon.

	A) ĉiuj landoj krom B	B) B-Landoj
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-02-15	350,00 EUR	250,00 EUR
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-05-15	400,00 EUR	300,00 EUR
Aliĝo kaj pago ĝis la 2010-06-30	450,00 EUR	350,00 EUR
Aliĝo kaj pago post la 2010-06-30	500,00 EUR	400,00 EUR

Aldonaj kostoj:

Aldonaj servoj / pagoj	A) ĉiuj landoj krom B	B) B-Landoj
Ekskurso al Varadero*	30,00 EUR	30,00 EUR
Aldono por individua ĉambro	90,00 EUR	90,00 EUR
Nemembroj (aŭ ILEI aŭ UEA)	25,00 EUR	15,00 EUR
Bufedo (aldona pago)	20,00 EUR	20,00 EUR

*Nur personoj kiuj pagas plene kaj ne ricevas subvencion havas la eblecon partopreni la ekskurson, kiun ofertas la ILEI-konferenco, sed ni informas ke la ekskurso okazas samtempe kun la seminario, do oni perdus parton de la seminario.

Donacoj:

Ege bonvenaj estas donacoj. La partoprenantaj organizoj planas subvencii kelkajn personojn kiuj alikaze neniel havus la ŝancon partopreni. Ne nur seminarianoj povas donaci! Ni esperas ke multaj homoj rimarkas la grandan ŝancon kiun ni havas en tiu jaro formi spertulojn, instruistojn kaj Esperanto-aktivulojn en la amerika kontinento por havi pli bonan Esperanto-estontecon en tiuj landoj.

Donacojn vi povas sendi al ILEI, al la Amerika Fondaĵo de UEA aŭ al la Fondaĵo Mondo (speciale en Germanio; vi ricevos kvitancon). Bv. ĉe ĝiro ĉiam indiku en la koncerna linio “donaco seminario Kubo” kaj informu pri via donaco al la retadreso: kubo2010@esperanto-mexico.org .

Kontoj:

1.) ILEI (konto ilek-a ĉe UEA) (Informoj pri pagoj al UEA: http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

2.) Amerika Fondaĵo de UEA, (Informoj pri pagoj al UEA: http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

3.) Fondaĵo Mondo (en Germanio), kontonumero: 151100004, gvidn-ro: 60090100, Stuttgarter Volksbank. El eksterlando: IBAN: DE21600901000151100004 // BIC: VOBADESS, Stuttgarter Volksbank.

4.) Fondaĵo “Esperanto al Ameriko”, Konto: stif-r ĉe Flandra Esperanto-Ligo IBAN: BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1, Postbank, Koloniënstraat 56, B-1000 Brussel.

Pliaj informoj:

Por ricevi pliajn informojn skribu al:
kubo2010@esperanto-mexico.org